1954, voltou a discutir a questão. Finalmente, a 10 de dezembro de 1954, a Conferência, em sessão plenária, aceitou a resolução, segunda a qual ela reconhecia que os resultados alcançados pelo Esperanto no campo do intercâmbio intelectual internacional e no esforço de maior aproximação dos povos concorriam aos fins e ideais da UNESCO, isto é: defesa da paz, mediante melhor compreensão entre os povos; difusão da cultura e educação; intercâmbio de ideais, conhecimentos e pessoas; colaboração internacional nos setores da educação, ciência e cultura; afastamento das dificuldades criadas pela diversidade das línguas; estímulo da educação que colima a cidadania mundial; divulgação da literatura clássica e contemporânea por meio de traduções; difusão do conhecimento científico; padronização das terminologias técnicas e facilitação da livre propagação de idéias pela palavra ou pela escrita.

O texto preciso da Resolução foi o seguinte:

IV.1. 4. 422 — A Conferência Geral, tendo considerado o relatório do Diretor-Geral sobre a Petição Internacional a favor Esperanto:

IV.1. 4.4221 — toma o conhecimento dos resultados alcançados pelo Esperanto na esfera das relações intelectuais internacionais e na aproximação dos povos do mundo;

IV.1. 4.4222 — reconhece que estes resultados correspondem aos fins e ideais da UNESCO;

IV.1. 4.4223 — inteira-se de que vários estados-membros expressaram estar dis-

postos a estabelecer e ampliar o ensino do Esperanto nas escolas e os solicita que mantenham o Diretor-Geral informado acerca dos resultados obtidos neste campo;

IV.1. 4.4224 — autoriza o Diretor-Geral a acompanhar a evolução do uso do Esperanto na ciência, educação e cultura, e, para este fim, colabore com a Associação Universal de Esperanto em assuntos que concernem a ambas as organizações. (Registros da Oitava Sessão da Conferência Geral; Montevidéu, 1954. Resoluções, p.36).

A Resolução de 10 de dezembro de 1954 veio corresponder às sábias e clarividentes palavras do Relatório do Secretariado da Liga das Nações, citado na introdução deste documento. O progresso da Língua Internacional na segunda metade de sua existência até o presente foi tamanho e tão significativo, que a mais importante organização internacional de educação, ciência e cultura não pôde deixar de reconhecê-lo. Hoje o Esperanto tem fortes raízes sociais, e suas perspectivas para o futuro são ainda mais notáveis. Seu valor social cresce de dia a dia, simultaneamente com o aumento do número de pessoas que o começam a aprender e empregar em suas relações internacionais. A utilização ainda mais generalizada da Língua Internacional terá consequências muito importantes para o desenvolvimento geral da cultura e para a unificação moral do mundo.

Londres, 5 de janeiro de 1957.

Kanaan

(Eltiraĵo el traduko de la romano "Chanaan", de *Graça Aranha*)

Reatinginte la vojon, Maria terurita, spireganta, ankoraŭ daŭre kuris, por iri for, for de tiu loko. Ŝia kurado kondukis ŝin al malgranda densejo, kiun la vojo trapasis. Tie ŝajnis esti pli malhele, kaj Maria haltis, timante penetri en la ombron. Ĉe la eniro de la densejo, kun frostotremo ŝi akompanis per rigardo la internan vojeton, ĝis ŝi rimarkis la alian lumetan eliron, kie finiĝas la arbaro. En tiu trairejo grandaj papilioj, bluj kaj grizaj, flugis tien kaj reen... Maria restis staranta ĉe la rando de la densejo, sen kuraĝo eniri, sen kuraĝo foriĝi. Neklarigebla profunda altiro al tiu ombra terura loko tenis ŝin ekstaza... El ŝiaj tremantaj manoj falis ŝia paketo da tolaĵo. Lacekonsumita kaj subpremita vidi sin, sen helpo, surprizita nokte en plena dezerto, la mizerulino falis apud centjara arbo kaj tie, kun la okuloj fermitaj kaj streĉita orelo ŝi atendis la bruojn kaj la sekvon de la okazaĵoj... Laŭmezure kiel la ombro montriĝis en ĉiuj anguloj de la arbaro, kvazaŭ vaporeca elspiraĵo de la Tero, pliintensigis la vidopovo de Maria. Ŝia ekscitita imago sentis, ke la tuta naturo agitiĝas por ŝin sufoki. La ombroj pligrandiĝis. En la ĉielo, koloraj ŝvelformaj nuboj ruladis al abismo de la horizonto... Ĉe la intermonto, je la krepuska lumo, la estaĵoj aspektis kiel monstroj... La montoj, leviĝante el la tero, stariĝis minacantaj... La vojoj, etendiĝante tra la kampoj, moviĝis kiel senfinaj serpentoj... La arboj ĝemadis, movitaj de la vento, kvazaŭ strangaj ploristinoj de la

morta naturo... Noktaj birdoj aŭdigis aŭgurojn per funebraj blekoj. Maria volis fuĝi sed ŝiaj lacaj membroj ne obeis al puŝoj de la timo kaj ŝi restis terenĵetita, senesperige.

La unuaj lampiroj komencis flugeti, striante la aeron per siaj lumetoj... En la ĉielo multnombraj steloj ankaŭ ekbrilis... La lampiroj multobliĝis interne de la arbaro; iom post iom ili aperis silente, grandnombre, sur la arbotrunkoj, kiel lumaj punktoj venantaj el la radikoj... Venkita de la dormo, la malfeliĉulino sternis sin sub la arbo kaj ekdormis... La agitiĝo de la naturo ĉe la sojlo de la nokta mistero kvietiĝis. Ĉio, kio estis malpreciza, konfuza, en la konturo de la aĵoj, fariĝis klarege neta. La montaroj montriĝis en siaj senŝanĝaj pozicioj; la arboj dissemataj en la valo, perdis la aspekton de strangaj fantomoj... En la hela aero ĉio reprenis sian indiferentan fizionomion. La lampiroj jam ne enflugis; miriadoj kaj miriadoj da ili kovri la arbotrunkojn, kiuj radiis, kvazaŭ ili estus plenigitaj de enkroĉigitaj diamantoj kaj topazoj. Iluminado sorĉe alloga en la tropika arbaro: la lampiraj lumetoj disjetis verdan helecon nuancitan de ondoj flavaj, oranĝkoloraj kaj bluetaj. La konturoj de la arboj reliefigis, ĉirkaŭvolvigitaj de zodiaka fosforesko. La lampiroj inkrustiĝis sur la folioj kaj ĉie, kontraste kun la ĉirkaŭaj mallumaj punktoj, trembrilis smeraldoj, safiroj, rubenoj, ametistoj kaj aliaj gemoj kun mirigaj koloroj. Sub la potenco de tiu lumo ĉio silentadis. Oni ne aŭdis plu la blekojn de malbonaŭguraj birdoj. La vento ĉesis; ĉie la bonfarema luma kvieteco... Maria montriĝis ĉirkaŭita de lampiroj, kiuj kovris la malsupron de la arbo sub kiu ŝi dormis. Pro ŝia absoluta

senmoveco, tiu orkolora borderaĵo formis ĉirkaŭ ŝi triumfan aŭreolon. La blanka karno de la pala, diafana virino kontrastis el la luma verdaĵo de la arbaro, kvazaŭ opalo enkadrigita en la verda mezo de smeraldo. Poste, nekalkuleblaj lampiroj ankaŭ garnis ŝin; ŝiaj ĉifonvestoj malaperis sub tiu troabundo da lampiraj juvelŝtonoj. La kompatindulino tiamaniere vestita, senmova, trankvile dormanta, ŝajnis pretigita por aliri fantazian feston en la ĉielo, por fianĉi niĝi kun dia estaĵo... Kaj ĉiam grandkvante falis la lampiroj sur ŝin, kiel larmoj stelaj. Sur ŝia blonda kapo brilis lumreflektoj bluetaj, violetaj. Tuj poste, la tuta korpo malaperis kaj la lumaj insektoj alvenis ankoraŭ pli kaj pli, kiel se la arbaro tute dispece tiĝus en lumajn erojn, kiuj falis sur la korpon de Maria, ĝis ŝi estis metita en miregindan tombon. Iun momenton la junulino levis delikate la kapon kaj malfermis la okulojn, kiuj kvazaŭ-blindiĝis; multkoloraj fulmoj ŝanĝbrilis... Maria pensis, ke sonĝo portis ŝin al ora abismo de iu stelo, kaj ŝi tuj ree falis dormanta sur la teran supraĵon...

La nokta silento estis rompita de la unuaj mildaj ventetoj de la matenkrepusko. La steloj malaperis el la ĉielo kaj la lampiroj ĉesis lumeti kaj timeme komencis kaŝi sin en la arbaro. Sur la arbo, kiu ŝirmis Marian, birdoj ekkantis kaj baldaŭ el ĉiuj anguloj en la arbaro melodiaj sonoj plenigis ŝiajn orelojn, donante al ŝi grandan plezuron. Post la vekigo de la birdoj ĉio ekheliĝis per alia lumo. La bruo komenciĝis; la arbara aromo, koncentrita dum la nokto, dissemiĝis forte tra la vekiginta naturo. Post kiam la lampiroj ŝin lasis, tiel senigante ŝian korpon el la misteraj gemoj,

Maria ekeliĝis el la sonĝo, kaj tiam ŝia nescio pri ia kulpo kaj ŝia kunmiksiĝo kun la Universo fordisiĝis, forte repuŝitaj de ŝia konscio. Ŝi rekonis sin, memorante siajn suferojn. Ekkaŭptis ŝin terurego. Imagante la danĝerojn, kiuj povus esti atingintaj ŝin ĉe tiu dezerto, ŝi leviĝis subite kaj foriris, kurante. Dum ŝi trairis la arbaron, malgraŭ la teruro sentita, persistis la memoro pri la forta lumeco, kiu montris la miraĝon ekviditan dum la spektaklo de tiu mireginda nokto. Sed kiam ŝi alvenis al la libera vojo, tie ŝi jam trovis la sunon, sub kies flama potenco tute malaperis la iluzio de ŝia sonĝo.

C. C.

NE PETU MULTON AL LA VIVO

Ne postulu troon. Lernu havigi al vi ĝojon el la malgravaj, humilaj aferoj. Kulturu vian internan mondon, kaj tie vi trovos nesuspektitajn fontojn de kontentigo. El la blindulo, kiu ridas; el la kriplulo, kiu kantas; el la malliberulo, kiu esperas, lernu la lecionon pri la stoikeco.

Serĉu la purecon en la okuloj de la infanoj; la fidon en la koro de la patrinoj; la amon en la lipoj de la virino kiun vi aspiras; la kariton en via propra animo.

Estu feliĉa kun la malmulto, kiun vi posedas. Gardu vian malgrandan bonajon, kiel la avarulo sian oran moneron.

Trad. KOTINJU

? LA MISTERO

ROMANO

*Afrânio Peixoto, Coelho Neto, Medeiros e
Albuquerque, Viriato Correia*

XXXIII

LA SPEKULACIA EPOKO

Al la senmezura malfeliĉo de Leonor estis nur unu solvo — la forkuro el la ungegoj de la monstro, kiu persekutadis ŝin — por trovi iom da paco kaj forgeso. Ŝi maldungis la servistojn, prenis la meblojn kaj juvelojn, la reston de sia pasinta havaĵo kaj kune kun la filo ŝi iris por helpo ĉe diskretaj amikoj: al ili ŝi rakontis sian tutan teruran situacion kaj petis, ke oni savu ŝin, ke oni sendu ŝin for de tie, al Rio, kie ŝi havis kelkajn parencojn, ĉar ŝi intencis labori tie por gajni sian vivopanon kaj nutri sian filon, kiu devus venĝi ŝin poste...

Ho! certe li venĝos ŝin! Ŝi koncentrigis ĉiujn fortojn de sia animo, la tutan kapablon de sia malamo sur tiun penson... Travivante ŝian tragikan destiron, ŝi pensis pri analogaj situacio, kvankam mala de la Grafino Camors kaj ŝia filo, forlasitaj de la edzo kaj patro. Ĉi tiu spionante ilin unu nokton aŭdis la edzinon, kiu lernigas preĝon al la infano kaj en ĝia preĝo la infano petis Dion pri pardono al li: al ŝia filo, al la malgrandeta Petro, ŝi lernigos malamon al la malvirta Sanches Lobo kaj kaŝos de la infano lian samsangan devenon, tiamaniere, ke poste la malbonulo estus kvazaŭ sia propra viktimo.

Al kelkaj simplaj personoj tio povus ŝajni malvarma kruelaĵo, tute ne humana, sed ili devas atenti, ke oni ne povas rezoni kun pasia virino, viktimo de la plej abomeninda krimulo, kontraŭ kiu, ŝi rajtis sin venĝi tiel kruele. Li estis lia filo, certe! Sed multe pli filo de ŝia honto, de ŝia martiro, kaj la venĝo estos tiel granda kiel la krimo, kiu kaŭzis ĝin.

Oni ne devas forgesi, ke tiu pasia generacio de la fino de la romantika epoko, troigema kaj stranga, vidas nur en la vivo mem la nekredblajn solvojn de sia fantazio. La moralo de la romantikismo permesis ĉion ekcepte la banalaĵojn de la burĝaj solvoj. Leonor estis

brilha persono, ŝia spirito estis plena de ĉiuj tiuj fantazioj, tiel ŝi estis malbone preparita por la vivo kaj la senfina ĉagreno instigis ŝin al la plej teruraj intencoj. Certe la bonkoraj personoj indulgos ŝin, ĉar ŝi suferis eĉ iom tro.

Tiel ŝi venis Rion, kie ŝi konis la penigan vivon de mizero kaj sufero, sed de tiam la malvirto kaj korupto ne pli atingis ŝin. Ekde tiu tempo ŝi okupigis nur pri la edukado de sia filo, kiu devis venĝi ŝin. Ŝi plenumis multegajn subulajn oficojn: sukerajistino, puntistino, kudristino kaj fine poŝtoficiistino — kun forto kaj kurajo nur por trafi la celon. La animon de la filo ŝi formis konforme al sia doloro, por anstataŭigi lian devenan naturon — kiu tre maltranviligis ŝin pro troa granda simileco al la patro — per la edukado, kiu estas ja alia naturo. Tiel, malrapide, tago post tago, ŝi sukcesis detruji ĉion, kio, laŭ ŝi, venis de lia origino; tiel, ŝi starigis en lia nova animo la kulton al la nomo, kiun li havis, de la honorinda viro, kiu mortis, en ĉagreno kaj mizero, suferinte kiel ankaŭ ŝi kaj la infano, pro nura kulpo de fripono ankoraŭ ne punita de la morto.

La kompato al tiu, kiu naskis lin, la amo al la memoro de la viro, kiu, laŭ lia penso, estis lia patro kaj samtempe la enradikigita malamo al Sanches Lobo estis la konstantaj kaj daŭraj sentoj de la infaneco kaj juneco de Petro Albergaria. Kiam poste, post multe da tempo venos la horo de la venĝo — Leonor estis certa — ŝia filo ne neglektis uzi la tutan malamon, kiu elfluis el ŝi.

En ŝia antaŭtempa maljuneco kaj dekadenco nur ĉi tiu penso, kun kiu kaj por kiu ŝi vivis, nur ĉi tiu penso iom pli dolĉigis al ŝi la morton, ĉar ŝi estis certa, ke ŝi estos venĝita per monstra venĝo, unika en la historio de la homaj krimoj: por la fripono Sanches Lobo nur tia revengo...

Sed la jaroj estis pasontaj kaj Sanches Lobo antaŭ ol la kulprepago devos koni aliajn malglorajn triumfojn. En Recife estis lia dandperiodo, en Bahia, kun pli da senhonteco li estis virinekspluatisto kaj fripono laŭ la propraj ecoj de sia karaktero. Ne ekzistis loĝejaĉo, kaŝita dometo kun malbona reputacio, eleganta klubo aŭ publika domo vizitata de riĉuloj, kiujn li ne konis.

Sed flanke de tiu malbona konduto la financisto kapabla pri ĉiuj malho-

nestaĵoj kaj krimoj estis atenta kaj zorgema kaj partoprenis en ĉiuj negocoj. Bankeldonoj permesitaj aŭ kaŝitaj, entreprenoj, kiujn tuj post la enspezigo de la kapitalo, malaperis en la ombro kaj en la silento, kiu antaŭiras la malhonestan likvidon: kontrakto pri loterio sen premio; liverado al la ŝtato por la sesoblo de la valoro, en ĉio la aventuristo havis parton, kaj kvankam li dividis la profiton kun siaj kunuloj li amasigis grandan kvanton da mono. Kaj tiu avideco mem perdis lin en Bahia.

Ĉe la komenco de la Respubliko la malnova Brazilo, honesta kaj lojala kiel Petro II mem, malaperis: en tiu tempo la famo kalumniis ministrinon, kiu poste mortis subite havante nur kvin milrejsajn en la poŝo, kiu fine estos honorigita per statuo, alia, kiu, pro senpripenseco havis amikojn ne tre skrupulemajn, akuzitajn kiel kontrabandistojn, estis pro sia senprudenteco trenita sur kalvarian vojon. Tiuj estis la skandaloj en la Imperia epoko, nemultvaloraj skandaloj, kiujn la ĵaluzo kaj la partiaj revenĝoj incitis, ili kreskis kaj baldaŭ neniigis pro malgrandiĝo laŭ la justaj proporcioj sub la serena digna juĝo de la nacia estro — la honesta suvereno. Post li la Respubliko, kiu anstataŭis lin perdiĝis en senĝala diboĉo de la spekulacia epoko, en la suspektinda advokateco ĉe la administracio, en la kartludoj, ĉiuj hazardludoj, de la riĉeco ĝis la sentoj, de la havaĵoj ĝis la honoro, kaj fine, kiam la ondo de korupto forpasis, ĝi firme stariĝis, sed ne reakiris la bonan famon. Restis tamen la kutimo fari negocon, al kiu la politikistoj sin adaptas kaj per kiu ili vivas.

En tiu tempo Sanches Lobo ne estis perdinta sian tempon. Li havis diversspecajn entreprenojn, kies kapitaloj estis la plej fantaziaj kaj la intencoj la plej mallogikaj. La spekulacio atingis tian gradon de frenezeco, ke nek nomoj nek adresoj estis necesaj al la grandegaj entreprenoj, kiuj vivis sur la papero kaj per la mono de la senprudentaj akciuuloj. Estis kompanioj de fero kaj feraĵaroj kiuj instalas terkulturajn vilaĝetojn; kompanioj de vakso aŭ ceramiko, kiuj konstruis fervojojn, kompanioj de kulturo de kasio, kiuj konstruis domojn por malkara luado; kompanioj de kando destinitaj al la bredado de brutaro kaj tiel plu. Krom tio garantio pri procentoj, liveradoj al la ŝtato, kontraktoj kun ĝi,

transakcioj ĉiuspecaj, kiujn kondukas al la publika ŝtelo sistematigita kaj projektata de la ŝtato mem.

Sanches havis rapidan kaj feliĉaman imagovon, ne kontraŭstareblan kaj senlaman kuraĝon tiagrade, ke li akirus la plej grandan riĉecon en Brazilo en tiu epoko, se ne estus fatala destino, ke tiuj labirintaj financoj kaptas en siaj implikajojn la plej grandajn ruzulojn kaj eĉ la friponojn, kiu ilin kreis.

Ĉiuj profitoj de liaj kompanioj estis englutitaj de la pruntitaĵoj al la ŝtata Kaso, pli kaj pli senmona, ĝis ĉe la frakaso, akuzita de la famo pro multaj ŝteloj, dum nekalkulebla homamaso antaŭ lia pordo postulis la redonon de ĝia mono metita en la bankrotintaj entreprenoj, petis helpon al la Polico kaj ĉi tiu pro tio, ke ĝi ne povis fari pli ol doni al li konsilon, ke li malaperu, forlasu Bahian, kunportante la promeson, ke oni pagos al li iun tagon, en iu atako de nekredebla prospero, de la multo, kiun li ŝtelis de unuj kaj pruntis al aliaj.

Sanches Lobo enŝipiĝis kaŝe al Rio, kun la espero, ke li povos iam ricevi ion de la pruntitaj sumoj ĉar li ne konsideris vera la popolan maksimumon — ŝtelisto, kiu ŝtelas ŝteliston havas 100 jarojn da pardono.

AFRANIO PEIXOTO

Tradukis

VITALA SPACO

La juna geedza paro vizitas apartamenton ĵus konstruitan (40 m²). Ĝi ĝajnas bona, en la nuna tempo. Sed la edzo deklaras:

— Ĝi ne servas, estas tro malgranda por ni.

— Permesu al mi klarigi — diris la luiganto de la loĝejo — ke ĝi estas konstruita ĝuste por 2 personoj.

— Eble vi pravas, konkludis la tudeziranto, sed la malhelpaĵo konsistas en tio, ke ni posedas ruĝan fiŝeton, kaj ne estas spaco por enlokigi ĝin.

Aperfeiçoe o seu conhecimento

La Grandanimeco de Caxias

Humberto de Campos

Venkite, en la 3-a de Aprilo 1832, de majoro Luís Alves de Lima, kiu ekmarŝis kontraŭ lin kun taĉmento da policanoj, majoro Miguel de Frias forkuris, penante sin forsavi. Lin pelante, Alves de Lima estis jam lin atingonta, kiam jen iu malamiko pafis sur la persekutanton per pistolo, kio faligis la ĉevalon kaj do ebligis al la forkuranto malaperi.

Ree marŝante antaŭen, Caxias estis tiam informita, ke la ribelestro rifuĝis en domon sur la strato Sabão, en la nova parto de la urbo. Li desaltis de la ĉevalo, kaj la domomastro malfermis libere al li la domon, kiun Caxias ja traserĉis. En la fino de koridoro montriĝis pordo, en kies seruro sidis ĝia ŝlosilo. La registara partiestro turnis la ŝlosilon kaj malfermis la pordon. En la mezo de la ĉambro Miguel de Frias, starante, lin atendadis. La du herooj, sen parolo, ekrigardis unu la alian. Post momento Alves de Lima fermis post si la pordon kaj foriris, dirante al la domomastro:

— Pardonu min; ĉi tie neniu estas...

En la sekvanta tago Miguel de Frias forrapidis en Usonon, kie li prenis al si azilon.

P.C.N.

(Tradução do trecho publicado no número anterior)

Nekrologo

Mortis en Niterói, la 16 an de Majo 1958, 75-jara, nia sindona, karmemora samideanino Balbina de Moraes. En ĉi tiu numero oni legos detalan priskribon pri ŝia vivo kaj amo al Esperanto, verkitan de nia samideanino Edith Wehrs.

Jugoslavaj Eldonaĵoj

RAKONTOJ

El la Naciliberiga Batalo de Jugoslaviaj Popoloj Elektis kaj tradukis Antonije Sekelj

Prezo Cr\$ 40,00

SUSPEKTINDA PERSONO

Duakta Komedio Tradukis Antonije Sekelj

Prezo Cr\$ 60,00

PROVINCA GASTEJO

Strangaj Rakontoj verkis Bojidar Trudiĉ

Prezo Cr\$ 40,00

ANALFABETO kaj BUTONO

Unuaktaj komedietoj tradukis Bojidar Trudiĉ

Prezo Cr\$ 40,00

DU NOVELOJ

Ĉe la Malnova Fajrejo-Silvia verkis Branko M. Radaković

Prezo Cr\$ 50,00

SONETKRONO

POR LA ESPERANTISTARO

Okaze de 70-jara Jubileo de Esperanto 1957

Prezo Cr\$ 35,00

Aperfeiçoe o seu conhecimento

A Índia e o Jacaré

A flor d'água, percebia-se um ponto escuro e imóvel.

Eu diria uma pedra, se Malila não me affiançasse que era um jacaré.

— Quer ver como eu vou pegá-lo?

Sorri incrédulo, mas ela, sem esperar resposta, recomendou-me que ficasse por ali mesmo e logo desapareceu da minha vista.

Passados alguns instantes, ei-la que surge entre o capim da beirada oposta. Marchava cautelosa e trazia um longo fio, provávelmente qualquer embira de cipó, a escorrer-lhe dos cantos da boca. A cada passo, redobrava de astúcia e já andava de rasto, cosida aos pedrouços da ourela do poção. Assim conseguiu chegar até um grande lajedo, que se adentrava pelo rio, em respaldo íngreme e sobranceiro. Foi aí que se acocorou, bem no tópo do alcantil, mas velada por uns esgalhos, e ficou a atentar longamente para a sua prêsa, o mesmo ponto imóvel e escuro, já então pertininho. De repente: catrapus! Malila jogara-se sôbre o jacaré. Mal tive tempo de desferir um grito, enquanto a água espadanava por todos os lados e ela surtia a meio busto, abraçada ao dorso do enorme sáurio. A luta era feroz e o monstro, tomado de surpresa, rabeava enfurecido, de cabeça aprumada e fauce hiante. Mas foi só um momento e ambos mergulharam rápido, sumindo-se num turbilhão de espuma. Logo a seguir, já nas minhas vizinhanças, nova agitação da água e Malila que aparecia outra vez, sempre às carranchas no animal. Aí, porém, a fera já não estava tão impetuosa, pois que a indiazinha conseguira vol-

tear-lhe fortemente a mandíbula com a corda levada entre os dentes.

— Este está pronto, disse-me ela, com o rosto aclarado por um riso de satisfação. E puxando a sua presa pela ponta da embira, pôs-se a nadar calmamente em direitura a mim.

Gastão Cruls

Daremos a tradução dêste trecho, para confronto, no número seguinte.

A PRONÚNCIA EM ESPERANTO

Pode parecer, já a esta altura, infantil, ridículo ou impertinente — ou tudo isto junto — que ainda se escreva sôbre a pronúncia em Esperanto. A meu ver, todavia, nunca nenhum assunto é por demais debatido, porquanto sempre existem, ou os que o ignoram ou mal o sabem, ou os que possuem a respeito idéias já estabelecidas, mas erradas.

Não pretendo aqui discorrer sôbre ortoépia ou sôbre fonética, setores muito delicados, aos quais tantos estudiosos se dedicam tôda a vida. Objetivo, neste momento, apenas um ponto, cuja gravidade eu não poderia silenciar, em face de atentados que mesmo professôres cometem, inculcando assim a seus alunos, futuros irmãos d'armas, um vício que lhes poderá ser imorredouro, pois *assim* lhes ensinaram.

Há muitos anos, bem me lembro, um coidealista estrangeiro, em visita à sede da nossa Liga, observou que pronunciamos demasiado fraco o "r" intermédio de vocábulos do Esperanto. Como sabemos, o "r" do Esperanto não deve ser muito fraco (como, p.ex., no português "caro"), nem muito forte (como em nosso "carro"), e, de preferência, dental: é, pois, um "r" médio. Note-se, de passagem, que tendo, em Esperanto, *cada letra um único som*, êsse "r" é o mesmo onde quer que se encontre no vocábulo.

Quanto às vogais "e" e "o", ensinamo-las sempre "fechadas", isto é, *ê* e *ô*, sendo, porém, que devem ser "médias": nem "ê", nem "é"; nem "ô", nem "ó".

Tudo isto, porém, são bagatelas em comparação com o hábito *errado*, *aten-*

BRAZILA KRONIKO**CEARA**

Limoeiro do Norte — Nia samideano d-ro Deoclécio Lima Verde malfermis elementan E-kurson, kun kuraĝiga nombro da gelernantoj, ĉe la sidejo de "Associação Cultural de Limoeiro do Norte. Ni deziras bonan sukceson.

BAHIA

Salvador — La 31-an de marto, ĝenerala kunveno de Associação Bahiana de Esperanto elektis la novajn estraranojn por la periodo 1958-1959: Prez. Dr. José Siquara da Rocha; vicprez. Ing. Lauro Sampaio; 1-a sek. Prof. Leopoldo H. Knoedt; 2-a sek. Kap. Godofredo de Araujo Góes; 1-a kas. Manuel Cavadas Duran; 2-a kas. Oscar da Silveira; bibl. Alvaro C. Carvalho. Fakoj: propaganda kaj kultura — Edmilson S. Moura; socia kaj arta, Angelita Cunha Dias; virina, Wilma Lima Campos: junula, José Carlos A. Barbedo; kursoj, prof. Valdina Magalhães Caymi.

Itapetinga — La 30-an de marto la Komunuma Urbestro Jovino Oliveira, kun granda akompanantaro, inaŭguris la novan straton *Esperanto*. En la nomo de la esperantistoj danke parolis prof. J. Pessoa, prezidanto de la loka Esperanto-Klubo.

ŜTATO RIO DE JANEIRO

Volta Redonda — Volta Redonda Esperanto-Klubo, ĉe la Lernejo São Judas Tadeu (strato 31, n-ro 113) faras elementan E-kurson, ĉiujaŭdon, de la 20-a ĝis la 21-a horo, sub la direkto de nia samideano João Andrade.

RIO GRANDE DO SUL

Pôrto Alegre — Esperantista Societo de Pôrto Alegre elektis sian novan estraron, la 8-an de aprilo:

Prez.-D-ro Ernani Correa: vicprez. Ary Zamora; 1a sekretario Solon Sant'Anna; 2-a sek. Carlos Aurich; Kas. Romeu Souza; bibl. Boris Eston.

RIO DE JANEIRO (D.F.)

Coligaĉo Espirita de Assistência inaŭguris elementan E-kurson ĉe sia sidejo (strato Lavradio n-ro 74, 1-a etaĝo). Gvidanto: nia samideano Walter J. Nogueira.

Henryk Sienkiewicz

QUO VADIS ?

Romano el la tempo de Nero
El la pola lingvo tradukis Lidia
Zamenhof

Nova eldono

1 vol. Cr\$ 500,00

RETORIKO

Kun aparta konsidero al la esperantlingva
parolarto

Verkita originale en Esperanto de D-ro
Ivo Lapenna

2-a eldono reverkita kaj kompletigita

Bindita Cr\$ 600,00

Brosurita Cr\$ 500,00

O SERVIÇO DE LIVROS DA**LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO**

pode fornecer qualquer obra em ou sôbre a Língua Internacional que se encontre no comércio nacional ou nos mercados estrangeiros.

PEÇAM O NOVO CATÁLOGO, EDIÇÃO DE 1959, QUE ESTÁ SENDO DISTRIBUÍDO.



Balbina de Moraes

Fraŭlino Balbina Augusta de Moraes naskiĝis en Manhauçu (Ŝtato Minas Gerais) la 12-an de junio 1883.

Jam en sia infaneco ŝi montris inklinton al studado kaj meditado kaj tute ne ŝatis amuzojn. Loĝante en la internlando ŝi tamen ne havis ŝancon viziti duagradan lernejon kaj estis devigita vastigi siajn konojn pere de legado kaj aŭtodidaktó. Ŝia forta volo pelis ŝin antaŭen.

Kiam la familio translokiĝis al Rio de Janeiro, ŝia patro donis al ŝi muzikinstruiston, do ŝi lernis teorion, harmonion, ludi mandolinon kaj pianon. Ankaŭ lecionojn de la franca lingvo kaj de la pentrarto la patro proporciis al la studema filino.

Tiamaniere ŝi fariĝis kapabla instrui kaj eduki siajn tri plej junajn gefratojn. Ŝi eĉ malfermis etan ler-

nejon, en kiu ŝi vigle laboris dum kelkaj jaroj.

Kun sia plej aĝa frato, D-ro João Ferreira de Moraes, ŝi lernis kontosciencon kaj fariĝis lia diligenta kaj efika helpanto. Tamen tiu ĉi laboro, kiu postulas akuratan skribadon, tre lacigis ŝiajn jam malfortajn okulojn.

En 1920 ŝi havis ankoraŭ la eblon legi sed nur kvazaŭ metante la okulojn sur la libron kaj sidante ĉe forta lumo. Iom post iom ŝia vidkapablo malpli-grandiĝis. Kiam ŝi konstatis, ke baldaŭ konstanta punkto ĉirkaŭos ŝin, la ĉiam agema sinjorino decidis lerni la brajlan alfabeton kaj post mallonga tempo jam sufiĉe bone majstris ĝin. Sed, ĉar estas tre malmultaj la libroj skribitaj por blinduloj, ŝi nepre bezonis personon, kiu legis al ŝi. Do estis ŝia patrino, kiu fariĝis ŝia plej sindona helpanto kaj ankaŭ gvidanto.

En la sama epoko amikino komencis dediĉi kelkajn horojn semajne al komuna studado kun la digna blindulino. Kaj kiam la maljuna patrino ne plu estis inter la vivantoj, la amikino fariĝis ŝia precipa kamaradino kaj tiamaniere estiĝis amikeco, kiu pli kaj pli intimiĝis.

En 1935 (aŭ 1937) la studema sinjorino aŭdis pri Esperanto kaj tuj komencis lerni ĝin. Ŝia instruisto estis S-ro Almeida, kiu ankaŭ suferis pro manko de vidkapableco. Entuziasmita ŝi tuj instigis la amikinin samtempe lerni la helplingvon. Ankoraŭ en la sama jaro ambaŭ fariĝis anoj de Brazila Esperanto Ligo, do ankaŭ de Ŭniversala Esperanto-Asocio. De tiam, iom da tempo de la komunaj studhoroj estis dediĉitaj al Esperanto. F-ino Balbina daŭre stimulis al perfektigado en la uzado de la lingvo kaj entuziasme partoprenis kunvenojn esperantistajn, ĉiam, kiam estis iu oportuneco. Malgraŭ ĉiuj

SAŬDADO

Coelho Neto

La loĝejo de la Saŭdado havas la nomon Memoro: ĝi estas kabaneto, ĉe angulo de la Koro. La loĝanto, malgaja, solece vivanta, traserĉas en la kampoj de la Tempo, sekvante la Horojn, same kiel la Moabidino, Rut, kolektadis spikojn sur la kampoj de Boaz, post la rikoltistoj.

Nokte ĝi revenas kun plenigita sako, kaj konservas kion ĝi rikoltis en la grenejo de la rememoro, por helpi al si dum la senecaj tagoj.

Kiam ĉi tiuj alvenas, kun la malvarmo, kiu rigidigas kaj la melankolio de la vintraj ombroj, la saŭdado alportas sian kolektitan grenon al muelilo de la Memoro, ŝutas ĝin en la grenkribilon kaj restas aŭdante la knaradon de la muelŝtono ĝin pulvoriganta, kaj pretiganta la farunon per kiu nutras sin la malgajulino.

Kelkfoje falas grenero, preskaŭ nenio. Tamen la Saŭdado rapide kaptas ĝin. Kion valoras tia peceto? Ho, multe! ĝi estas eta rememoro, tamen grandvalora substanco, kiu, profitita, oferas feliĉan momenton, sekundon da ĝuo, rapidan tempeton de rideto, de rigardo, de kiso, de parolo; estas fulmoj, efemeraj fulmobriloj, kiuj igas nin vidi preterflugi feliĉaĵojn de nia juneco.

Tiuj malgrandaj neniaĵoj, kiujn la Saŭdado profitas, atomoj de la pasinteco al estanteco portitaj, similas greneron, metitan en subteran tombon, ĉe dumia sarkofago kuŝanta sub la tero dum jarmiloj. Iun tagon, realportita al la tersupraĵo kaj denove plantita en malseka grundo, varmigita de la suno, aerumita, ĝi ĝermas, aperigas trunketon, elkreskas kaj liveras panon.

Trad. KOTINJU

(Daŭrigo de p. 24)

malfacilaĵoj ŝi tre ŝatis instrui Esperanton kaj ĉiuj, kiuj havis la feliĉon esti ŝiaj lernintoj, fakte akurate lernis, ĉar ŝi donis grandan valoron al bona prononco kaj korekta formo.

Kiel idealisto ŝi kompreneble ne nur amis la lingvon mem, sed ankoraŭ kore akceptis kaj propagandis la internan ideon de Esperanto.

Ŝi estis ano de Niteroi Esperanto-Klubo ekde ĝia fondo en 1947, kaj fervore laboris por ĝia firmigo kaj evoluado, ĉiam kuraĝigante, varbante klubanojn, konsilante kaj antaŭenpelante. Ŝian persistemon kaj fortan volon la respektinda maljunulino pruvigis dum la dek jaroj de ekzistado de N. C. K., aperante ĉe ĉiuj kunvenoj,

malgraŭ la ofte malbona vetero, malgraŭ la laceco, kiu lastatempe ne plu volis forlasi ŝin. Ŝia korpo maljuniĝis, sed ŝia animo daŭris vigla ĝis la lastaj tagoj. Per tiu ĉi vicleco ŝi venkis ĉiujn malfacilaĵojn, eĉ la pezon de la multaj vivjaroj. Do, kun la malapero de tiu ĉi nobla, sindonema kaj fortanima sinjorino, nia klubo perdis unu el siaj plej valoraj membroj.

D-ro Mario Ritter Nunes, longjara prezidanto de N. C. K., en januaro de la nuna jaro, ĉe la lasta solena kunveno de nia klubo, reliefigante la altajn ecojn de la blinda samideanino, jene sin esprimis: "Fino Balbina estas la simbolo kaj personiganto de ĉiuj noblaj kvalitoj." Kaj li estis tute prava.

Edith Wehrs

Ni parolu ne tro rapide

Ĉiu el ni havas sian propran temperamenton kaj ankaŭ sian manieron paroli kaj prononci sian gepatran lingvon; tute nature, tiu maniero restas — aŭ emas resti — kiam ni parolas en Esperanto.

Se vi vere mastras la lingvon, estas permesate al vi paroli tre rapide, kaj tio ne tro ĝenas... Kondiĉe, ke tiu, kiu aŭskultas vin ankaŭ estu sperta kaj senpene kapablu sekvi la torenton de viaj vortoj.

Sed, krom admirindaj esceptoj, se se vi tro rapidas, vi riskas preteratenti la *tre gravan* plilaŭtigon de la antaŭlasta silabo, vi riskas ne sufiĉe apogi sur la konsonantoj, — eble, vi pli facile riskas uzi malprecizajn terminojn aŭ formulojn, senkonscie — imiti naciismojn aŭ malobei gramatikajn regulojn, kaj se sono ne sufiĉe neta eliĝas el via buŝo, aŭ se eraro enŝoviĝas en viajn dirojn, tiam via aŭskultanto estas en la danĝero ne plu sekvi vian frazon kaj li eĉ malĝoje perdiĝos en la senspira malvolviĝado de viaj rezonoj.

Male, se vi prononcas klare, sonorvoĉe, ne tro rapide, via aŭskultanto povas ja multe pli facile ĝui ripozan momenteton, dank'al kiu li tuj retrovas la ĉefan ideon, kiu gvidas vin.

Tia vola nerapideco prezentas ankaŭ moralan flankon: ebligante, ke alia samideano facile kaj agrable komprenu vin, vi samtempe pruvigas, ke vi estas pacienca, afabla kaj kuraĝigigas lin sammaniere respondi al vi.

Cetere, al kio utilis fluego da paroloj, se oni ne povus senhezite kompreni ilin? Por kio oratoro esprimus brilajn pensojn, se oni ne povus tuj percepti ilin?

Modera malakcelado dum konversacio ne estu konfuzata kun balbutado, nek kun konstanta hezitado aŭ kutima serĉado de vortoj! ĉar, efektive, eĉ en nacia lingvo, ofte necesas intence bremsi la ordinaran parolan rapidecon por pli forte insisti pri iu detalo, por pli taŭge instrui iun pri nova afero, — iafoje por konvinki kaj varbi aŭskultanton.

Al mi ŝajnas, ke senekcesa malrapideco estas despli konsilinda, kiam du — aŭ pluraj — diversnaciaj esperantistoj konversacias: tiam la etaj malsamaj nuancoj, neeviteblaj en la aŭdigo de la konsonantoj kaj de la vokaloj, kvazaŭ svenos pro la kristala pureco de perfekta prononcado.

Roland JOSSINET.

(El "Franca Esperantisto," Dec. 1957)

Zamenhof

La nomo ZAMENHOF estas germandevena — Samenhof. Ĝi signifas: Korto de semoj. Lia korto estas tre honora korto, kaj multe pli utila por la mondo ol iuj reĝaj kortegoj, kiujn mi povus mencii. Zamenhof estas taŭga nomo por homo, kiu semis kaj semis konstante. Al ĉiu lernanto en ĉi tiu kunveno kaj aliloke, mi diras: "Se vi estas bona semo, vi post ne longe fariĝos ankaŭ semanto, kreanto kaj kulturanto de ankaŭ aliaj semoj. Vi estas Zamenhofanoj — anoj de la korto de semoj — kies sana, vigla kresko benas la socion."

(El parolado havita antaŭ la Melburna Zamenhof-Festo, 14-12-1957)

F. R. Banham

Recenzo

J. D. Applebaum — JOZEFO — Drama poemo en kvar aktoj kaj epilogo, bazita sur la Biblia rakonto — Prezento de Reto Rossetti — Stafeto — Bel-Literatura Eldon-Serio 10 — Eldono de J. Régulo, Eldonisto — La Laguna, Kanariaj Insuloj — 1957. 1 vol. 120 p. 16 x 22 cm. Prezo en la libro-servo de B. E. L. Cr\$ 160,00.

En mallonga tempo nia brava eldonisto Juan Régulo Pérez donis al ni 11 belajn volumojn: 10 pure beletrajn kaj unu popular-sciencan, nome "La Vivo de la Plantoj", kiu ankaŭ estas en bela literatura stilo.

La Aŭtoro de ĉi tiu volumo, Jakob David Applebaum, naskiĝis la 14-an de Novembro 1877, li havas do 81 jarojn, kaj eklernis Esperanton en 1909.

Ni ŝuldas al lia iniciato la belan monumenton en la tombo de Zamenhof.

Kiel lerta tradukinto, li famiĝis pro la tradukoj de "Struvelpetro" kaj "Vojaĝoj kaj mirigaj aventuroj de Barono Munchhausen".

La biblia rakonto pri Jozefo estas en la ĉapitroj 37 ĝis 5505 de Genezo, sed la Aŭtoro iom resumas ĝin por ne tro longigi la teatraĵon.

La versoj de la poemo estas senrimaj, sed tre plaĉaj pro la bela kadenco.

Krom la konversacioj en longaj heksametroj, aperas en la dramo belaj kantoj en sepsilabaj versoj. La poemo estas plia originala majstroverko en nia lingvo, kies originala teatraĵo estas ankoraŭ malriĉa je valoraj poemoj. Antaŭ nelonge aperis de la tre juna poeto Geraldo Mattos la tragedio "Ivan la Sesa" kaj nun de la

maljuna Applebaum la dramo "Jozefo". Laŭ la aĝo, Geraldo Mattos povus esti nepo de Applebaum, tial aperas tri generacioj de talentaj poetoj kunlaborantaj por la riĉigo de nia literaturo.

La lingvo de la verko estas klasike perfekta. Jen la kanto de la knabinoj:

*Estu ĝojo en la vivo,
Plengajeco ĉiam ĉie,
De la kanto la motivo,
Gaje sonu melodie.*

*Bela kanto sendas benon
Por la maltrankvila horo
Kaj forpelas la ĉagrenon
Eĉ plej granda el la koro.*

*Sonu do, ho dolĉa kanto,
Sonu kanto tiel sorĉa,
Ebriĝu la aŭdanto
Per feliĉa sento dolĉa.*

Laŭ la Aŭtoro, la periodo de la okazintaĵoj estas ĉirkaŭ la jaro 1706 antaŭ Kristo; do proksimume 3.664 jaroj antaŭ niaj tagoj. Tiam la homoj estis senkompare malpli bonaj ol en nia tempo: la fratoj de Jozefo vendis lin kiel sklavon kaj trompis la maljunan patron.

DU AMSENTAJ NOVELOJ: — *Imenlago de Theodor Storm kaj Maruška de Mela Escherich — El la germana lingvo tradukis Alfred Bader — Eldono de Svisa Esperanto-Societo, Bern — 1 vol. 41 p. 15,5 x 23 cm, broŝ. Prezo en la libroservo de B. E. L. Cr\$ 80,00.*

"Imenlago". Maljuna profesoro eniras hejmen posttagmeze, laca, eksidas en sia kabineto por iom ripozi. La subiranta suno tra fenestro jetas siajn radiojn sur portreton de bela

knabino. Li rigardadas ŝian belan bildon kaj liaj rememoraĵoj vekigās: li kaj ŝi estis amikaj najbaraj infanoj, kunludantoj, lerneĵaj gekolegoj. Poste li transloĝigās por studi en Universitato. Ŝia patrino ordonas al ŝi edziniĝi kun blenulo, amiko de ambaŭ. En la bieno ĉiuj lin frate estimas kaj invitas lin por la ferioj. La edzo forvojaĝas kaj lin lasas sola kun la juna edzino, rekomendinte al ŝi lin amuzi per promenadoj. Ili multe promenas nenium vorton eldiras pri amo, sed ambaŭ konstatas, ke ili varme amas unu alian kiel en la lerneĵaj jaroj. Ŝia koro ŝin turmentas: ŝi klare komprenas, ke la edzon ŝi ne amas. Li tiam forkuras por ĉiam de la bieno, por ne perfidi la amikon kaj ke ŝi restu ĉiam ĉasta edzino. Nun maljuna fraŭlo li ĉion rememoras kun resopirado.

“Maruška” estas bela, petolema siberia knabino, kelnerino por sia patro en vilaĝa gastejo. La vilaĝaj junuloj ambicias ŝian koron, kantas al ŝi belajn amdeklarojn, kiujn ŝi moke respondas per improvizitaj rikanemaj strofoj.

Traveturante tiun stepon, juna grafo eniras en la gastejon por duhora ripozado. Li alparolas la belan kelnerinon kaj rakontas al ŝi, ke li estas fianĉo kaj veturas al sia fianĉino, kiu lin atendas post longa vojaĝado tra aliaj landoj; tial li ne tranoktos en la gastejo, malgraŭ la danĝeroj de neĝstormoj kaj luparoj atakantaj la regionon. Ŝi petas lin, ke li permesu al ŝi kunveturi ĝis la proksima vilaĝo, kie ŝi volas viziti parenĉinon. Dum la vojaĝo luparo atakas la vojaĝantojn. Ŝi kaj li pafas, sed senutile, ĉar la lupoj estas multegaj kaj malsataj. La grafo deklaras al ŝi ke ili estas ĉiuj perditaj. Ŝi deklaras al li sian varman amon naskita antaŭ kelkaj

horoj, lin pasie kisas, kaj sin ĵetas al la lupoj, por doni al li tempon por forkuri. Dum la lupoj ŝin manĝas, la grafo saviĝas kaj ĝoje atingas sian fianĉinon, kiel ŝi deziris.

Belaj, ĉastaj amrakontoj, kiujn ĉiu esperantistino ĝojos legi kaj relegi. Lingvo kaj preso tre bonaj.

J. C. Heer — ĈE LA SANKTAJ AKVOJ — Romano el la svislanda montegaro — El la germana lingvo iradukis A. Bader, P. le Brun, J. Schmid — Eldono de Svisa Esperanto-Societo, Bern — Bele bindita volumo en du partoj: unua parto 81 p., dua parto 135 p., formato 15 x 23 cm. Prezo en la libroservo de B. E. L. Cr\$ 250,00.

Senhezite ni povas taksii ĉi tiun volumon kiel unu el la plej elstaraj monumentoj de la mondliteraturo. En brila lingvo la libro rakontas pri la vivo, kutimoj, tradicioj, folkloro, superstiĉoj de malgranda katolika vilaĝo enkadrita en la svisaj Alpoj.

Kvankam la popolo estas katolika, bonkora, obeema al virta paroĥestro, neniam faras eĉ plej malgrandan krimon, ĝi tamen havas malnovajn superstiĉajn kredojn, kiujn la katolika edukado ne sukcesis elradikigi el la animoj. Duonfreneza fanatikulo, iama seminariano ekskomunikita de la Eklezio, tie loĝas kaj ekspluatas la superstiĉojn de la simplaj vilaĝanoj, kiuj de li gviditaj penis mortigi virtan junulinon, kiel oferon al paganaj dioj por ŝirmi la popolon kontraŭ supozitaj danĝeroj.

Feliĉe oni ĝustatempe defendas ŝin kontraŭ ilia furiozeco, kaj ŝi estas nur vundita.

La vilaĝa vivo estas plena de ĉarmo, de virto, kaj la karaktero de la ĉefroluloj estas tre neta. Precipe la vilaĝestro, lia juna filino kaj ŝia fianĉo aperas majstre karakterizataj en la romano.

La Aŭtoro estas genia verkisto, kaj liaj tradukintoj montrigis kompetentaj por sia nefacila tasko. Preskaŭ neniu germanaĵo aperas en la libro.

Certe ĉiu esperantisto fieros posedi en sia biblioteko tian belan volumon por ĝin de tempo al tempo re-trelegi.

Revizio, preso, papero, bindo mola.

LA VOJO DE LA VERO KAJ SAĜO — aŭ *La Vero*, malkaŝita en la Biblio, kiel io distingebla de la Kristana Teologio — Senpage kaj afrankite havebla de A. H. Broughton, *The Square, Gunnislake, Cornwall, Anglujo*. 32-paĝa broŝuro, 11,5 x 18 cm.

Laŭ la Aŭtoro, la tuta Vero estas en la Biblio kaj oni devas ĝin tie serĉi, sed sen la teologiaj interpretoj. Ĉiu homo devas rekte trovi la Veron. La bela broŝuro estas plena de frazoj el la Biblio kaj certe plaĉos al fervoraj kredantoj.

Mi tute ne estas kompetenta pri la Sanktaj Skriboj.

Johan Hammond Rosbach — **HOMOJ KAJ RIVEROJ** — Fasko de rakontoj pli-malpli veraj. Eldonejo KOKO — Konversacia Klubo — Kopenhago 1957 — 1 vol. bele bind. 140 p. 13 x 20,5 cm. Prezo en la libroservo de B.E.L. Cr\$ 320,00.

La brila aŭtoro de "Bagatelaro" donas al ni 20 novajn rakontojn kun Glosaro, Klarigoj kaj tradukoj, bele verkitajn originale en Esperanto flua, korekta, plaĉa, pri kiu certe ni ĉiuj fieras.

La aŭtoro estas talenta verkisto kaj suferis la teruraĵojn de la germana okupado de lia patrolando, kiam li mem estis ne nur enkarcerigita sed ankaŭ turmentita de la Gestapo. Pri tiuj tagoj de teroro li verkis kelkajn rakontojn, kiuj eternigos en la literaturo la memoron pri la nazia krueleco.

Aliaj rakontoj estas malpezaj, pri turismo, grandaj kaj famaj riveroj, sed ĉiam plaĉaj dank'al lerteco de la verkisto.

En la fino de la volumo estas glosaro de neologismoj, malmultaj kaj preskaŭ ĉiuj jam konataj. Alia pli longa listo estas de klarigoj kaj tradukoj de fremdaj vortoj kaj historiaj, geografiaj, literaturaj terminoj aperantaj en la volumo.

Iom post iom formiĝas nia originala literaturo, la unua vere universala trezoro por krei unuecon de la tutmonda penso.

Jean Ribillard — **VAGADO SUB PALMOJ** — Eldono de *Universala Esperanto-Asocio*, Rotterdama, 1956. 56 p. 13,5 x 21 cm. broŝ. Prezo en la libroservo de B.E.L. Cr\$ 120,00.

Bela libreto kun 20 kliŝoj pri vojaĝoj tra Afriko. La Aŭtoro estas oficiro de la Franca Armeo en Afriko kaj lerte prezentas al ni, en originala korekta Esperanto, siajn travivaĵojn en Saharo kaj en diversaj oazoj.

La kutimoj de la afrikanoj, iliaj vivkondiĉoj, juĝaferoj, ĉio venas al ni hejmen tre nete, dank'al la talento de la Aŭtoro.

Vojaĝado tra tiuj dezertaj regionoj certe estas tre maloportuna por ordinara homo, tial ni kontentiĝu per la legado de tiu interesa libro.

La lingvo de la Aŭtoro estas korekta kaj tre plaĉa, vere originala, sen ia naciaĵo.

La papero, preso, revizio estas perfektaj.

Prof. Svetislav S. Petroviĉ — **SONETKRONO POR LA ESPERANTISTARO** — okaze de la 70-jara jubileo de Esperanto — Julio 1957. Eldonis Serbia Esperanto-Ligo, Terazije 42, Beograd, Jugoslavio. 1 vol. 9 x 14 cm. 30 p. Prezo en la libroservo de B.E.L. Cr\$ 35,00.

Ĝi estas la n-ro 6 de la kolekto "Nova Libro." La poeto plej lerte interplektas la florojn en tiu krono. Ĉiu soneto estas akrostiko kaj la unua verso de la 14 sonetoj formas la 15-an. La frazoj formitaj de la unua litero de ĉiu verso estas:

Espero realiĝos. Sana nia princip'. Edifas nin esper'. Rikolto nia riĉa. Apliko ravas nin. Naskiĝas la fest'. Triumfi devas ni. Ivo Lapenna agis.

Sublima nia sent'. Tempo venas bela. Adeptoj, ó amikar'. Radias nia rondo. Ondas ĝi ĉiutage. Esperantistaro.

La belaj pensoj de niaj poetoj kreas novan menson por la homaro.

Ĉiu esperantisto fieros posedi kaj ofte retralegi tiun sonetaron.

József Darvas — AMARA PANO — El la hungara tradukis Ladislao Somlai. Eldonis Libro-Servo de Dana Laborista Esperanto-Asocio. — Kontrolita de la Literatura Komitato de S.A.T. — 1 vol. broŝ., 111 p. 15 x 22 cm. Prezo en la libro-servo de B.E.L. Cr\$ 230,00.

Lerte verkita rakonto pri la mizera vivo de terlaboristoj en Hungarujo.

La Aŭtoro rakontas siajn proprajn travivaĵojn en malgranda farmo, kie estas nur paro da gelaboristoj: li mem kaj juna servistino, kiu sin trudas al li, fariĝas lia edzino kaj naskas infanon.

La mastrino estas bonkora, ĝentila, sed la mastro estas duonfreneza, perfortema, kruele batas sian serviston kaj minacas lin mortigi, sed post la kolero reafabliĝas kaj bedaŭras sian propran konduton.

La Aŭtoro envas la iamajn sklavojn, al kiuj neniam mankis pano nek loĝejo ĝis la morto, dum kompatinda servisto ofte ne trovas laboron kaj devas malsati, precipe kiam li maljuniĝas aŭ malsaniĝas kaj jam ne povas vigle labori. La kabano de unu el tiuj maljunaj laboristoj brulegas kaj dum la incendio oni trovas lin tute freneza, dancante kaj kantante ĉirkaŭ la fajro. Li havis en mizero edzinon kaj infanojn; ĉiuj estis malsataj kaj malsanaj. Lia laboro ne prosperis. Eble li mem pro freneziĝo bruligis la kabanon.

La celo de la libro estas propagandi socialismon, sed lerte kaj diskrete, nur per prezento de sociaj maljustaĵoj ekzistantaj en la hungaraj kampoj, kie mizeraj vivokondiĉoj detruis la homan dignon, la ĝojon vivi, la esperon pri la estonteco; sed la Aŭtoro mem ne klare konceptas la ŝanĝojn fareblajn en la socia organizado: li estas malklera, laŭ la rakonto, naskiĝis en tia mondo kaj ne scias imagi al si ion alian. Lia patro ankaŭ estis terlaboristo kaj mortis en milito, lasante vidvinon kun infanoj en mizero; tial la vidvino kaj la infanoj devis labori kiel sklavoj por vivi.

Lingvo korekta kaj eleganta. Revizio, preso, papero tre bonaj.

JAPANAJ Fabeloj — Dua eldono reviziita — Eldonita de Amo-Akademio, Tenmori, Kōzōji, Aiĉiken, Japanujo 1957. 1 vol. 60 p. 13 x 19 cm. Bele ilustrita.

Laŭ la enkonduko de Kotohito Macubara, tiuj fabeloj estas el prahistoria tempo, ĉiam transdonitaj de generacio al generacio, tial ili havas apartan signifon por ni okcidentanoj, ĉar ili kreis por la japana popolo nociojn pri virto kaj malvirto, justo kaj puno, simile al laj religiaj libroj de ĉiuj konataj. En la Biblio de la judoj kelkaj libroj kiel Rut, Ester, la rakonto pri Jozefo, vendita de siaj fratoj, k.a. estas malnovaj rakontoj neniel religiaj en la antikvaj tempoj; ili eĉ havas nenian religian valoron, sed enŝoviĝis en la Bibliion kaj fariĝis parto de sankta libro universala.

Fabeloj ankaŭ kreas pensmanieron kaj influas la konduton de homoj kaj popoloj. Tiun belan libron mi legis kun granda atento pro la delikata senco de justeco el tiuj pratempoj.

Ne nur infanoj sed ankaŭ maturaj homoj trovas grandan intereson en tiu bela libreto.

I. G. B.

POR NIA LINGVA PERFEKTIĜO

Asen Simeonov

Kutime oni diras, ke Esperanto estas facila lingvo. Tio estas vera nur rilate al la ceteraj lingvoj naciaj. Efektive, Esperanto estas lingvo genie simpligita. Ĝia gramatika kaj sintaksa strukturo donas senlimajn eblojn por krei enhavoriĉajn esprimformojn. Tamen, en la momento, kiam oni decidas lerni ĝin perfekte, buŝe kaj skribe, oni renkontas malfacilaĵojn kaj rapide konvinkiĝas, ke Esperanto estas lingvo tiel subtila, esprimoplena kaj nuanĉoriĉa, kiel la ceteraj lingvoj, kaj sekve ĝi postulas daŭran, persistan kaj sisteman studadon.

Perfekte scipovi lingvon, estas alta arto. Simile al ĉiu majstreco, scipovon de lingvo oni atingas nur post diligenta kaj konscienca laborado. Oni povas fariĝi majstro de lingvo nur post multa ekzercado, samkiel post multa ekzercado rajdisto ekregas impetan ĉevalon, violonisto — violonon, pianisto — pianon, samkiel pentristo post longa peniga laboro komencas majstri penikojn kaj farbojn, skulptisto — argilon, ĉizilon, martelon kaj ŝtonon.

Majstreco ne venas per si mem. Majstrecon oni povas konkeri nur per fidela, persista, senĉesa laboro. Sed eĉ atinginte relativan majstrecon, *oni ne devas stari sur la sama loko*, ĉar lingvo senĉese evoluas. Pri lingvo pleje validas la diro de la fama greka filozofo Heraklito: *Panta rei* — ĉio fluas. Pro tio aŭ ni supreniras la ŝtuparon al la altaĵoj de lingva perfekteco, aŭ ni regresas.

Lingvo estas io viva. Ankaŭ Esperanto estas en la plena senco de la vorto lingvo vivanta. En ĝi pulsadas la koro de ĝia popolo — la esperantistaro diversnacia, kiu ĝin parolas kaj kiu verkas en ĝi.

Por nia lingva kreskado kaj perfektigo ni bezonas bonajn verkojn, bonajn vortarojn, *ĉiutagan ekzercaĵon* en Esperanto — buŝan kaj skriban. Por kutimigi nian langon al belsona, eleganta elparolado, ni devas ĉiutage voĉlegi 2-3 paĝojn el bona verko. Tiam ni ne balbutos en klubo aŭ antaŭ alilandaj esperantistoj, sed flue konversacios.

Ni devas strebi senĉese al plibonigo de nia stilo, lernante ĉiutage ion de niaj grandaj majstro-klasikuloj — Zamenhof, Kabe, Grabowski kc, de niaj modernaj verkistoj — Kalocsay, Baghy, Waringhien k.a.

Ni devas strebi al simpleco kaj klareco, ne forgesante, ke perfekta harmonio signifas perfektan simplecon. Nebuleco en la vortoj pruvas malklarecon de la penso, netaŭgecon de la lingva instrumento. Neniam timu eltranĉi la superfluaĵojn, ili nur diluas la enhavon. Evitu troamasigon de vortoj, evitu ankaŭ superfluan plibeligon, ornamadon. Veran belecon oni kreas per simplaj kaj malmultaj rimedoj. Troŝargita stilo kunportas balaston, kiu lacigas kaj stumbligas la legantojn.

Ni devas esti precizaj, bone koni la ĝustan sencon de la vortoj.

La ĉiam pli vasta kaj grandskala uzado de Esperanto starigas antaŭ ni urĝan kaj gravan taskon: perfektigi en Esperanto. Laborante ĉiutage, sisteme kaj serioze, perfektigante senĉese, ni havos en niaj manoj taŭgan, akran instrumenton, per kiu ni rezultodone kaj utile laboros por koniginian landon kaj popolon al la tutmonda esperantistaro, por akiri novajn amikojn alinaciajn. Por tio ni donos nian modestan kontribuon al la tutmonda paco.

(El la monata kultura revuo "Nuntempa Bulgario", Dec. 1957).

La sincereco estas la komenco kaj la fino de ĉiuj aferoj. Sen sincereco nenio estas ebla.

KONFUCIO

★

La plej senutila tago en nia vivo estas tiu, en kiu ni ne ridas.

CHAMFÔRT

BIBLIOGRAFIO

Zofia Nalkowska - Medalionoj — Eldonejo "Polonia," Varsovio, 1957 — 112 p. Tradukis el la pola lingvo Tadeusz Hoda-kowski — kaj la enkondukon, Isaj Dratwer.

Dokumenteca libro, rekonita unuanimе de la pola kritiko kiel eminenta verko. La klera aŭtorino, konata pola verkistino, partoprenis en la laboroj de Cefa Komisiono por Esplorado de Germanaj Krimoj. En ĉi tiu verko ŝi vigle priskribis teruregajn faktojn okazintajn en la koncentrejoj sur la pola tero. Sole en la koncentrejo Oswiecim (Auschwitz) oni mortigis pli ol kvar milionojn da homoj (viroj, virinoj kaj infanoj), el multaj landoj.

Nalkowska diris, ke "Medalionoj" esprimas la miron, ke "homoj al homoj preparis tiun ĉi sorton."

La vojo de la Vero kaj de la Saĝo

La Vero, malkaŝita en la Biblio, kiel io distingebla de Kristana Teologio.

Senpage havebla de A. H. Broughton, The Square Gunnislake, Cornwall, Anglujo.

Sciencaj Studoj — Eldonita okaze de la 50-jara jubileo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE). Sub redakto de Paul Neergaard 241 p. en granda oktavo. Prezo: 4 us. dolaroj aŭ 50 steloj. KOKO, Randbolvej 4, Kopenhago F. Danlando.

La unua eldonaĵo en Esperanto, bazita sur nur originalaj esploroj kaj observoj el diversaj sciencoj. Krom la enkondukaj partoj, la volumo enhavas Parton humanisman, kun 15 traktajoj pri lingvosciencaj, historiaj, jura, psikologiaj k.a. temoj, kaj Parton matematikan, kun 21 kontribuaĵoj, pri temoj astronomiaj, matematikaj, geologiaj, kemiaj, fizikaj, zoologiaj, anatomiaj. Tiuj gravaj studoj de tiel impona verko montras la praktikan aplikon de Esperanto el la manoj de eminentaj sciencistoj.

Belarto — n-ro aprilo 1958

Literatura kultura aldono al la revuo "Esperanto," oficiala organo de UEA. Enhavas kolorbildon kaj muzikajon. Prezo: 13 steloj (por individuaj membroj de UEA, 11 steloj)

HOMBURG-SARLANDO — Faldprospektoj kun bildoj de Homburg, la "Urbo de la Arbo" kun Esperanta aldono.

La Internacio de Militrezistantoj — (War Resister's International) 88 Park Avenue, Bush Hill Park, Enfield, Middlesex, Anglujo.

Flugfolio klariganta la bazon de la organizaĵo. Ĝi kunligas individuojn kaj grupojn de militrezistantoj tra la tuta mondo por reciproka helpo kaj kuraĝigo. Ĝi eldonas libretojn en Esperanto, kaj en angla, franca kaj germana lingvoj.

Supren la korojn — Monata flugfolio.

Senpage por la tutmonda esperantistaro. N-ro 1, julio 1958. Redaktas Euclides Carneiro da Silva — Caixa Postal 3.245, São Paulo, Brazilo. Ĝi celas inviti gesamideanojn el la tuta mondo al kelkminuta meditado, ĉiumonate. Bonega spiritnivela legaĵo, por kredantoj aŭ nekredantoj.

INFANOJ DE LA MONDO, (Hongo 6-13, Tokio, Japanujo) estas la nova monata organo por la internacia kunlaboro de infanoj. 1 ekz. 2. resp. kup.

Bulteno Cirkulero de la Hungarlanda Esperanto Konsilantaro. Jan. 1958. Per Esperanto por la paco kaj por la socialisto.

ORA FIŜO — Bildteatro por infanoj de la mondo, Eldono de Amo-Akademio. Tenmori, Kozoĵi, Aiĉiken, Japanujo. Havebla ankaŭ ĉe Japana Esperanto Instituto Hogo, Motomaĉi, Tokio, Japanujo.

Internacia Pedagogia Revuo. Tute renovigita, aperas dumonate, sub la aŭspicioj de la franca asocio de Esp. edukistoj (G.E.E.) Redaktas A. Albaut, 8, avenue Et. Billières, Toulouse, France. Jarabono 500 francaj frankoj aŭ egalvaloro.

KOSMO — 28 p. Trimonata revuo, eldonata de la Spiritoscienca Instituto de Martinus — Prelegoj kaj artikoloj de Martinus kaj aliaj. Jarabono 6 ŝ. Mariendalsvej 94-96, Kopenhago.

EL POPOLA CINIO — Reaperis, eldonata nun de Ĉina Esperanto-Ligo. 36-paĝa, dumonata. Specimenon oni povas ricevi (P.O. Kesto 77, Peking, Ĉinujo). Aldonita al la ricevita n-ro: murkalendaro por 1958 kun "Floroj kaj Papilioj, pentraĵo de la fama ĉina pentristo Ĉen Hung Sou 1599-1652).

Esperanto-Missionen (Ostanjo, Svedujo) — Sveda Societo por konigi la

savon de Kristo. Evangelia serio — Kajero 5. H. Hubertsson: La Dia vojo al paco kaj ĝojo por savigo. 16 p. Kajero 6 — Anna Alamo — Sandgren. — Religia vivo en Svedujo. 20 p. Kajero 7 — Geknaba specialnumero 4 p.

BONN — Ilustrita faldprospekto, kun klarigoj pri tiu grava urbo en pluraj lingvoj, inkluzive portugalan kaj Esperanton (en aldono). Havebla senpage ĉe la delegito de UEA — Ernest Kind, Nordtrasse 97, Bonn, Germanujo.

KIEN LA POEZIO? de Brendon Clark, Novzelando, 156 p., bindita. Prezo 14 ŝilingoj. Eld. The Esperanto Publishing Company Ltd., 100 Long Lane, Rickmansworth (Herts.), Anglujo, 1957.

En tiu ĉi libro la aŭtoro, mortinta en Dargaville, Novzelando, la 9-an de novembro 1956, klarigis siajn teoriojn pri la uzo de *natura Esperanto* kaj montris per trafikaj, belaj ekzemploj kaj versaĵoj, originalaj kaj tradukital, kiel eviti elizion kaj la troan uzon de neologismoj en Esperantaj poemoj. La lastaj paĝoj de la verko konsistas el multnombraj *kvazaŭ-sinonimoj*, kiel B. Clark nomis tiujn vortojn, kiuj en apartaj kuntekstoj povas portempe funkcii kiel sinonimoj. Prezo Cr\$ 350,00.

NI SEMU POR VENONTO, de Omata Ikuo, 777 Hakoda-Kumagaya, Japanujo. 20 socistudaj Esperanto-lecionoj, por inteligentuloj.

Prospekto pri la Internaciaj feriaj kursoj de Esperanto en Elsinoro, la tre konata urbo el la dramo *Hamleto*, norde de Kopenhago (19-26 junio 1958).

Sennacieca Revuo 1958 — la 7-a el nova serio. Brilaj originalaj reportoj pri Islando, Saharo (petrolo) Formoso. Vivo de Leo Tolstoj, la fantazia insulo Sankta Brandano kaj aliaj interesaj artikoloj. Bonegaj kunlaborantoj, multaj ilustraĵoj.

El la historio de Klubo Esperantista de Malmö. Sistema librolisto de la biblioteko de Klubo Esperantista de Malmö.

Okaze de sia 50-jara jubileo (1906-56), Klubo Esperantista de Malmö transdonis verkon pri la historio de la Klubo dum 50 jaroj. Tion kontentige faris, studante la arkivaĵojn de la Klubo, nia samideano Gösta Henriksson.

La alia broŝuro entenas sisteman libroliston de la grava biblioteko de la Klubo, laŭ la litera klasifistemo, kons-

truita en 1921 de Komitato de svedaj bibliotekistoj kaj adaptita al Esperanto.

Joŝiroo Jamaguĉi — FACILA SEMAFORO ESPERANTA, 22 p. Eldonejo La Orienta Stelo — N-ro 4097, Kamicuruma, Sagamihara-maĉi, Kanagaŭa Gub-Japanujo.

La nuntempe ekzistanta internacia semaforo ne estas aplikebla al Esperanto. La aŭtoro aranĝis Esperantan semaforon, kiu laŭ normoj montritaj estas ia aplikebla al la aliaj plej uzataj lingvoj. Unu el la elstaraj karakterizoj de la metodo konsistas en tio, ke la plejmulto de silaboj estas signebla per unufoja dummomenta movo de brako aŭ brakoj. Do oni povas korespondi en multe malpli longa tempo ol laŭ la internacia semaforo, kiu konsistas el alfabetaj literoj.

(Conclusão da pág. 22)

tatório e profundamente *chocante* de se nasalarem as vogais juntas (na mesma sílaba ou em sílabas diferentes) de *m* ou de *n*. Se cada letra tem um único som, é incompreensível que as vogais percam o seu som, passando a ter outro... porque ao lado delas está certa letra. Não entendo por que, p. ex., "aro" se pronuncia direitinho "á-ro" (figuro aqui, e em tudo o mais, só a vogal em causa), mas "amo" há-de ser "ã-mo". Não sei por que, p. ex., "el" se pronuncia (em geral) "êl", mas "en" é "ē"; "vin" é "vī" (como o nosso "vin"); "dum" é "dū" (como o nosso "dum"), etc. Muda-se, então, o som (único!) da vogal e "engole-se" o "m" e o "n", que também têm direito e *devem* soar?!

Como decorrência natural, o acusativo não escapa; p. ex., "Bonan tagon!" soa "bōnā tágō" (a acentuação é posta no lugar próprio; aqui figuro os sons das vogais).

Isto, meu caro leitor, não é fantasia minha; esta "beleza" eu a tenho sistematicamente ouvido de... professores! Já ouvi de um professor a palavra "mem" pronunciada como o nosso "Mem"!!

Será, pois, o caso de perguntar: se, p. ex., "en" e "vin" êsses amigos pronunciavam como se fôssem vocábulos portugueses, que diriam êles mesmos se um francês os pronunciasse "à moda da casa"?!

Porto Carreiro Neto

Saluto de Pastro D-ro Johano Baptisto Kao O. F. N.

AL LA XV-A BRAZILA ESPERANTO
KONGRESO OKAZE DE KVINDEK-
JARA JUBILEO DE LA BRAZILA ES-
PERANTO-LIGO

Karaj Samideanoj,

Estas vera plezuro por mi partopreni tiun-ĉi XV-an Brazilan Esperanto-Kongreson, kiu koincidas kun la kvindek-jara Jubileo de la Brazila Esperanto-Ligo. Antaŭ ĉio, mi devas esprimi mian plej sinceran gratulon al la Brazila Esperanto-Ligo, pro ĝia Jubileo de kvindek fruktoplennaj jaroj vivitaj por la disvastigo de la internacia helplingvo Esperanto en tiu ĉi bela, vasta kaj Di-benita lando Brazilo.

La Brazila Esperanto-Ligo skribis dum duonjarcento glorajn paĝojn en la Historio de la Esperanto-movado; dank'al ĝiaj nelaceblaj klopodoj kaj penadoj, nia kara lingvo Esperanto akiris ne nur multajn adeptojn en ĉiuj anguloj de Brazilo, sed ankaŭ la oficialan simpation de la Brazila Registaro, kun financa kaj morala apogo por la movado en la lando kaj en la mondo. Hodiaŭ la Brazila Esperanto-Ligo elstaras kiel unu el la plej viglaj, plej fortaj kaj plej prosperaj organizacioj en Esperantujo. Ĝiaj gvidantoj, pasintaj kaj nunaj, plene meritas nian varman aplaŭdon por ilia konstanta, fervora kaj sindonema laboro farita por la movado. Mi ne dubas, ke la nuna Jubilea kongreso alportas novan entuziasmon kaj freŝan energion, kiu ankoraŭ plibriligos la estonton de la Ligo kun pli grandaj, pli sekuraj kaj pli longedaŭraj sukcesoj en la disvastigo de Esperanto. Kaj al vi, miaj karaj samideanoj, al vi

ĉiuj, kiuj venis el proksime kaj el malproksime, mi elkore bondeziras fruktoplennan kongreslaboron. Ni esperu ke la ĉion-pova Dio, Nia Sinjoro, estu kun ni dum la kongresaj tagoj kaj benu nian pacan laboron por pli frateca kaj pli harmonia kunvivado de la popoloj per plibona interkompreno!

Gazetaro, Radio & TV

Jorge Soares das Neves
(Fakdelegito por Radio de UEA)

Gazetaro

Ekde aŭgusto VOLTA REDONDA ESPERANTO-KLUBO laboras ankaŭ per revuoj.

Sub ĝia respondeco tri ĉiumonataj revuoj en la "Ŝtala Urbo" publikas informojn pri nia Movado, nome: VIDA DO ARTISTA BRASILEIRO (Vivo de la brazila artisto), CLĀ kaj O LINGOTE. La du lastaj apartenas al NACIA SIDERURGIA KOMPANIO.

Profiti la rimedojn mem de *neesperantistaj organizaĵoj* kompreneble reprezentas ŝparon kaj prestiĝon por nia Esperanto-Movado.

Varmajn gratulojn al VOLTA REDONDA ESPERANTO-KLUBO!

Alia grava komunikaĵo temas pri la Revuo SOLDADINHOS DE DEUS (Soldadetoj de Dio), kiu fariĝis *duonmonata* ekde la 15-a de aŭgusto. Tio gravas, ĉar ĝia *ilustrita Esperantokurso* ankaŭ aperas dufoje en la monato.

La alia publikaĵo de LEGIO DE LA BONA VOLO, "Revista da Boa Vontade", en septembro publikis ilustritan raporton pri la 3-a Regiona Kongreseto de la ŝtato Minas Gerais, okazinta de la 10-a ĝis la 13-a de julio en la urbo Caratinga.

Rádio

En Caratinga la loka radiostacio — ZYS-6, RADIO SOCIETO CARATINGA — disaŭdigis grandan parton de la ĉefaj kunsidoj dank'al la bona volo de la staciestro S-ro João Dor-nelas.

ĈIUTAGE! Ekde la 1-a de septembro RADIO CULTURA DA BAHIA prezentas ĉiutagan Esperanto-kurson en la programo "Só para mulheres" (Nur por virinoj), de la 14,30 ĝis la 14,45 (laŭ Rio). Instruas samideano Onias Almeida.

En la inaŭgura kvaronhoro parolis D-ro José Siquara da Rocha, prezidanto de ASSOCIAÇÃO BAIANA DE ESPERANTO, sub kies aŭspicio estas prezentata la kurso.

SANGIGIS la horaro de la Esperanto-kurso per RADIO ROQUETE PINTO. Nun ĝi estas prezentata de la 9-a ĝis la 9,30 horo ĉiusabate.

Kolora televido

Ĉi tiu novaĵo ne temas pri nia Movado. Tamen ĝi gravas.

Antaŭ nelonge la ĵurnaloj disvas-tigis, ke la provoj pri kolora televido realigitaj de B B C estis tre favoraj. Estas proksima la tago, en kiu oni povos elsendi sufiĉe bone tiajn tele-vidajn programojn en la samaj ondoj de frekvenco nun utiligataj.

Oficisto de B B C deklaris, ke estos necese solvi plurajn problemojn antaŭ ol meti la koloran televidon al la dispono de la ĝenerala publiko. B B C devos unue finveni al kompromiso okazigi tutlandan servon en nigro kaj blanko. La fabrikantoj siavice devos produkti aparatojn moderpre-

zajn. Krom tio tiaj televidaparatoj devas oferi sufiĉe bonan koloran ricevon.

SE VI VOLAS kunlabori, sciigu nin pri ĉio koncerne gazetaron, radikaj televidelsendojn. Sendu informojn rekte al BRAZILA ESPERANTISTO.

GRANDA PAŜO EN BRAZILLO

Kiel vi scias, dum preskaŭ du jaroj, Profesoro C. Tôrres Pastorino kaj ĉi tiu samideano prezentis Esperanto-programon sub la aŭspicio de LEGIO DE LA BONA VOLO. Komence per Radio Tamoio. Poste LBV aĉetis Radion Mundial kaj nia programo daŭris prezentate dum kvaronhoro, kiel plurfoje estas anoncote ĉi tie. Verdire estis nur fako en alia programo "Campanha da Boa Vontade" (Kampanjo de la Boa Volo).

Hodiaŭ finfine ni povas informi vin pri io tre grava por nia Movado: S-ro Alziro Zarur, Prezidanto de LBV, donis al nia Programo specialan karakteron. Nun ĝi estas memstara elsendo prezentata (ekde la 3-a de marto) de lundo ĝis sabato de la 6-a ĝis la 6-a kaj duono (laŭ Rio).

RADIO MUNDIAL — la Sendostacio de la Bona Volo — ne posedas ankoraŭ mallongondon. Ĝi havas nur mezajn ondojn kaj ne ĉesas elsendi, t.e., ĝi funkcias 24 horojn dum la tago. Grava punkto estas, ke RADIO MUNDIAL estas kompleta, ĉar ĝi prezentas programojn pri sporto, dan-carto, virinaj, medicinaj kaj religiaj demandoj ktp.; kaj ĝi estas la sola komerca radiostacio en Rio de Janeiro, kiu fakte favoras Esperanton.

S-ro Alziro Zarur donacis al Esperanto duonhoron dum ses tagoj en la semajno. Tio estas grava donaco

al nia Movado. Nia programo havas la titolon "Vamos aprender Esperanto?" (Ĉu ni lernu Esperanton?). Ni uzas Elementan Metodon de Prof. C. Tôres Pastorino (FD de UEA), kies unua eldono (de Brazila Esperanto-Ligo) estas praktike elĉerpita.

Preskaŭ en ĉiuj landpartoj ni havas aŭskultantojn. Eĉ de la plej malproksimaj bienoj ni ricevas leteron petante enskribon en la kurson kaj mendante la Metodon.

Dum la programo ni prezentas ĉion pri Esperanto: novaĵojn, muzikaĵojn, informojn, esperantajn registraĵojn. Ni instruas precipe la Internacian lingvon Esperanto sed komparante Esperanton kun la portugala lingvo oni senpretende instruas samtempe ambaŭ lingvojn. Tio donas bonan rezultaton kaj faras la programon alloga.

Krom tio ni ĉiam klarigas pri la veraj celoj de nia Movado. Ni insistas pri ĝia neŭtraleco ĉiusenca kaj vigle propagandas la por ni ĉefajn organizaĵojn, nome: Universala Esperanto-Asocio kaj Brazila Esperanto-Ligo. Ni ankaŭ vokas la atenton al nia literaturo kaj gazetaro. Kompreneble tio ne estas komplezo, sed de nia flanko nepra devo.

Sen troigo oni povas diri, ke nia Esperanto-Programo tiom sukcesas, ke ĝi jam fariĝas malgranda laŭ la opinio de niaj aŭskultantoj mem.

Estas rimarkinde, ke Rubem Braga, unu el la plej famkonataj brazilaj kronikistoj, en la tre grava Revuo "MANCHETE" spontanee kaj favore skribis pri la Esperanto-Programo de Radio Mundial. Tio gravas, ĉar ne nur esperantistoj parolu kaj skribu favore al nia Movado.

Nuntempe LBV havas 300.000 anojn enskribitajn. Tial LBV forte antaŭenpuŝas nian Movadon kaj per la Radiostacio Mundial kaj per siaj bonegaj revuoj "Boa Vontade" (Bona Volo) kaj "Soldadinhos de Deus" (Soldadetoj de Dio), kies eldonkvantoj estas 100.000-ekzempleraĵoj.

En decembro-56 HEROLDO kaj LA PRAKTIKO diskonigis artikolon pri nia agado en LBV. Ni ricevis multege da korespondaĵoj, per kiuj cetere ni intencas aranĝi specialan ekspozicion. Tamen ni ne havis okazon ankoraŭ publikigi informojn kaj statutojn de LBV en Esperanto. Ni petas de ĉiu skribinto iom pli da pacienco. Aliaj laboroj urĝas kaj ni volas fari ĉion bone. La administrantoj nun klopodas, ekzemple, ekipi Radion Mundial per mallongondo. Ĉu vi komprenas la gravecon de tiu plano eĉ por Esperanto? Do se vi bone taksas la kontribuadon de LEGIO DE LA BONA VOLO por la Esperanta progresado skribu al RADIO MUNDIAL, PROGRAMA "Vamos aprender Esperanto?", Av. Rio Branco, 181-3.º andar, RIO DE JANEIRO — BRAZILIO.

Ni antaŭdankas.

ESPERANTEJO

O "Diário Oficial" da União publicou, no número de 8 de maio, o extrato do Estatuto de Esperantejo, instituição dedicada ao Esperanto e às crianças desamparadas, fundada em 14-4-1958 por Abel Marques e sua esposa Edilza Barbosa Marques, em Comendador Soares, município de Nova Iguaçu. É uma organização civil para a difusão do Esperanto e a criação do orfanato "Vivenda da Luz". Será administrada por um Colegiado composto de 15 membros.

MIKSAJOJ

PADEREWSKI KAJ LA KNABO

Kiam la fama komponisto kaj pianisto Paderewski, eksprezidanto de la Respubliko Pollanda (1919-1921), staris unu tagon sur strato en Novjorko, iu knabo, vendante ĵurnalojn, proksimiĝis al li kaj proponis la lastajn vespergazetajn eldonojn. Paderewski atente rigardis lin kaj poste prenis el la poŝo unu dolaron kaj ĝin donis al la knabo, dirante:

— Mi ne volas aĉeti gazetojn. Faru nur ĉi tion: iru preni grandan banon, lavu bone vian vizaĝon, viajn orelojn, surmetu puran veston kaj estu feliĉa.

La bubo, mireganta, gardis la dolaron. Sed ankaŭ atente rigardante la komponiston, li subite tiris mone-
reton el la poŝo kaj ĝin donis al Paderewski, flustre dirante al li:

— Bone, miavice mi donacas al vi ĉi tion... kaj iru tuj tondi vian hararon.

★

LA MALGRANDA, BUNTA KOKINO

La malgranda, bunta kokino be-
kfosis en la korto kaj trovis tritikan spikon.

— Kiu semos tiun ĉi tritikon?
— diris ĝi.

— Mi ne volas! — diris la meleagro.

— Nek mi! — diris la anaso.

— Tiam devas mi, — diris la malgranda bunta kokino, kaj semis la grenojn de tritiko.

Kiam la tritiko maturiĝis, ĝi diris:

— Kiu nun portos la grenon en la muelejon?

— Mi ne! — diris la meleagro.

— Nek mi! — diris la anaso.

— Signifas, ke mi portos ĝin! — diris la malgranda kokino, kaj ĝi portis la grenon en la muelejon.

Kiam jam la greno estis muelita, ĝi diris:

— Kiu nun knedos panon el tiu ĉi faruno?

— Mi ne volas! — diris la meleagro.

— Nek mi! — diris la anaso.

— Restas do, ke mi knedos — diris la malgranda bunta kokino, kaj ĝi el la faruno knedis panon.

Kiam la pano estis bakita, ĝi diris:

— Kiu manĝu nun tiun ĉi panon?

— Mi! — ĝoje ekkriis la meleagro.

— Mi! — same tiel ekkriis ankaŭ la anaso.

— Ne, ne vi! — diris la malgranda bunta kokino — sed mi kaj miaj idoj; ni manĝos ĝin. Kvo, kvo, venu, miaj etuloj!...

El la makedona: M. D.

(La Suda Stelo, aprilo 1954).

AVIDO NE TAŬGAS

Homoj stulte donas sian sanon
Por rapide gajni multan monon.
Poste ili donas tiun monon
Nur por reakiri sian sanon.
Nun konstatas ili kun dolor':
Sano kun la mono estas for!

J. B.

(“La Libera Esperantisto,” Nov. 1957)

Ombroj ekzistas en ĉiu vivo, kaj seneraraj ni ĉiuj neniel estas. Ni devas la homojn preni tiaj kiaj ili estas, kaj ne tiaj, kiaj ni ilin deziras. Se ni ĉion sciuz, ni certe ankaŭ ĉion pardonuz.

Röntgen

(“Norda Prismo,” n-^o 2, 1958)

RIDU, NI PETAS

JUNULINO (jus diplomita pri piano-ludado) — Mi volas meti sur mian pianon buston de granda muzikisto. Kiun vi konsilas al mi, profesoro?

PROFESORO — Tiun de Beethoven.

JUNULINO — Kial?

PROFESORO — Ĉar li estas surda.

En la konsultejo

— Doktoro, diris la kliento, post kiam mia rompita fingro estos sana, ĉu mi povos ludi pianon?

— Kompreneble, respondis la kuracisto.

— Bonege! ekkrias la kliento. Mi neniam antaŭe sukcesis ludi pianon.

KURACISTO — Mi lasos tiun ĉi kuracilon, por ke vi prenu ĝin antaŭ la manĝado.

MALSANULO — Ĉu vi ne povos lasi ankaŭ la manĝaĵon, por ke mi ĝin prenu post la kuracilo?

INSTRUISTINO — Kion signifas pluralo?

LERNANTO — Ĝi signifas la saman aferon, sed en pli da kvanto...

PROVINCESTRO — Mi supozas, ke vi faris ĉiujn antaŭzorgojn kontraŭ tiu epidemio, kiu dezertigas la urbon, ĉu ne?

URBESTRO — Certe, sinjoro guberniestro. Mi jam pligrandigis la tombejon.

Du uloj surstrate

— Kion vi demandis al tiu sinjoro?

— Mi demandis al li: kioma horo estas?

— Montru al mi. Ĉu ĝi estas el oro?

Trad. L.A.M.

Homo, kiu posedas volon, estas homo feliĉa.

SCHILLER

PRI MIRAKLOJ

Pastro diskutas kun sia parohano pri la mirakloj.

— Se mi falus el kvina etaĝo teren kaj restus vivanta, diras la pastro, ĉu estus hazarda fakto.

— Ne, respondas la parohano, estus hazarda fakto.

— Se vi volas. Sed se mi falus ree de la sama alteco kaj restus vivanta, ĉu tiam ne estus miraklo?

— Ankoraŭ ne, estus eksterordinara ŝanco.

— Mi ne kontraŭdiras. Sed se trian fojon mi en la dirita maniero falus, ĉu ne certege estus miraklo?

— Ne pli multe, estus nur simpla kutimo.

L. Bernot

ANONCETOJ

Tridek aŭstraliaj knabinoj, aninoj de Esperanto-Rondeto en Sydney, deziras korespondi, letere aŭ bildkarte, kun ĝejunuloj el ĉiuj landoj, havantaj, maksimume la aĝon de 18 jaroj. Turnu vin al F-ino Grace Barlow, Strathfield High School, Albert Road, Strathfield/Sydney, N. S. W., Aŭstralio.

Dudekjara meksikiano, laboranta nun en la Usona Militŝpartrupo, deziras korespondi pri ĉiuj temoj kun brazilaj gesamideanoj, precipe pri politiko de la latinaj amerikaj landoj. Skribu al Federico Heney D., Angeles, Pamp. Filipinaj Insuloj.

Deksepjara studento deziras korespondi pri diversaj temoj kaj interŝanĝi bildkartojn kaj poŝtmarkojn kun dek kvinjaraj ĝis deksepjaraj fraŭlinoj. Adreso: Ladislav Láni, Ul. 1. Mája 11. Zilina, Ĉeĥoslovakujo.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn kaj poŝtmarkojn kun brazilaj junulinoj, Daniel Dairou, rue de la Condamine 21, Paris 17e, Francujo.

ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

AUSTRÁLIA — Retribuindo a saudação que fêz, de Melbourne, Austrália Esperanto-Asocio por ocasião do XV Congresso Brasileiro de Esperanto, em Niterói, em julho de 1957, Brazila Esperanto-Ligo enviou por via aérea a saudação dos esperantistas brasileiros ao XI Tutaŭstralia Kongreso de Esperanto, em Melbourne, em fita de gravação.

Falaram o dr. Carlos Domingues, A. Caetano Coutinho, Irani Baggi de Araujo pelos esperantistas brasileiros, Octavio Peixoto, pelo dr. Mário Ritter Nunes e Jorge Soares das Neves.

CHINA — A revista "El Popola Ĉinio" dá notícias do E. na China: Cursos em Xangai, Pequim e outras cidades. Ensino do Esperanto, como matéria facultativa, na Universidade Popular de Pequim. Grupos nas Universidades de Pequim e Nanquim. Fundação de Pekin Esperanto-Klubo. Compilado novo método para o ensino: "Elementa Kurso de Esperanto".

GUATEMALA — Guatemala Esperantista Asocio publica interessante boletim. O n.º 2, de out.-nov. 1957, traz notícias sôbre a distribuição de diplomas aos alunos que concluíram o primeiro curso de Esperanto organizado por essa associação. Traz também o poema da esperantista Angelina Acuña, que obteve o primeiro prêmio nos Jogos Florais da América Central e Panamá, celebrados anualmente, em setembro, realizados em Quezaltenango, assim como a sua tradução em Esperanto: "La Maizo de la Majaoj" (en 7 Stancoj kaj unu Preĝo.)

HUNGRIA — Acaba de ser impressa e exposta à venda a tradução de S. Szathmari, em língua húngara, da notável obra satírica "*Kredu min, Sinjorino!*", originalmente escrita em Esperanto por Cezaro Rossetti. Três semanas após ser exposta à venda, a edição de 15 mil exemplares estava esgotada.

IUGOSLÁVIA — *Iugoslavia Esperanto-Federacio* festejou o jubileu de ouro de sua fundação, por ocasião do XVII Congresso Iugoslavo de Esperanto, em Novi Sad, de 4 a 7 de julho. A Liga Brasileira de Esperanto enviou carta de saudação pelo festivo acontecimento.

LETÔNIA — *Espero Katolika* dá-nos uma notícia, verdadeiro recorde de propaganda e desenvolvimento esperantista: uma edição de cinco mil dicionários de Esperanto completamente esgotada em dez dias! Nova edição de mais 5.000 foi imediatamente iniciada.

MÉXICO — *Latinamérica*, excelente revista de cultura e orientação, inseriu em seu número de janeiro um belo artigo de Milton Paulo de Lacerda — "Como nasceu o Esperanto?"

NEPAL — Em audiência concedida a nosso samideano Tibor Sekelj, que passou seis meses em Nepal, o rei Makendra Bir Bikram Ŝah fêz a seguinte declaração: "Se as Nações Unidas reconhecem o Esperanto e o empregam em suas edições, então também Nepal sustentará a idéia e cooperará para introduzir êste eficaz instrumento de compreensão internacional".

PORTUGAL — No programa das Festas do Fim do Ano na ilha da Madeira constituiu um número de mérito e relêvo a Exposição Esperantista na cidade de Funchal, capital da Madeira. A revista semanal ilustrada *Mundo*, de Lisboa, em seu número de 30 de janeiro trouxe uma página sôbre a Exposição com várias fotos em que se vêem, entre a seleta assistência, o Governador de Funchal, o Sr. Bispo, o Dr. Jaime Vieira dos Santos e o Sr. M. Lourenço da Veiga, Delegado de U.E.A.

Brenden Clark

KIEN LA POEZIO ?

Estudo sôbre a essência e os rumos da poesia em Esperanto

1 vol. encadernado Cr\$ 350,00

George E. Wagner

LA SEĜO DEKTRIA

Interessante conto norte-americano, original em Esperanto

1 vol. Cr\$ 35,00

Esperanto na Imprensa do Brasil

Órgãos da imprensa brasileira, que inseriram artigos, informações ou referências sobre o Esperanto, os quais recebemos (e agradecemos) ou deles tivemos conhecimento:

AMAZONAS — De Manaus: *O Municipalista*, artigos de S. Augusto.

CEARÁ — De Crato: *Jornal de AAB*, artigos de A. S. Alcântara; de Ipu: *Ipu em Jornal*.

RIO GRANDE DO NORTE — De Natal: *O Jornal de Natal*, Esperanto em foco e palestra na Rádio-Nordeste, de Arlindo Castor de Lima; *A República*; *Diário de Natal*.

PERNAMBUCO — De Recife: *Diário de Pernambuco*, artigos de Calinício Silveira.

ALAGOAS — De Maceió: *Boletim Semanal de Rotary Club de Maceió*, palestra proferida por Paulino Santiago sobre Esperanto e Zamenhof.

SERGIPE — De Aracaju: *Correio de Aracaju*, artigo de Zózimo Lima.

BAHIA — De Ilhéus: *A Voz do Estudante*; de Itabuna: *O Intransigente*; *Diário de Itabuna*, art. de Eleus Sá; de Itapetinga: *O Itapetinguense*.

ESTADO DO RIO DE JANEIRO — De Niterói: *O Estado*; *O Fluminense*; *Diário Fluminense de Campos*: *A Notícia*, *Folha do Povo*; *A Cidade*, série de Coluna do Esperanto.

SÃO PAULO — De Taubaté: *A Voz do Vale do Paraíba*, série de artigos de J. P. e de Hugo di Domenico. De S. Paulo: *Publicações Farmacêuticas* (O Esperanto e a terminologia químico-farmacêutica, por Cícero Pimentel).

PARANÁ — De Curitiba: *Gazeta do Povo* (18-5-58), Panorama esperantista, arti. de Yolanda de Araújo Costa.

SANTA CATARINA — De Florianópolis: *O Estado*, A tragédia do Homem, de Madach, artigo de Giovanni P. Faraco.

RIO GRANDE DO SUL — De Porto Alegre: *A Reencarnação*; de Santa Maria: *A Razão e Boletim Mensal de Rotary Club de Santa Maria*, art. e palestra de Modesto Belmonte de Abreu.

MINAS GERAIS — De B. Horizonte: *O Diário*, *Minas Gerais* (órgão oficial), *Síntese*.

MATO GROSSO — De Corumbá: *O Movimento*.

RIO DE JANEIRO (D.F.) — *Coleção* (Derrubando a torre de Babel, Adrian Ball), *O Globo*, *Diário de Notícias*, *Careta*, *Tribuna da Imprensa*, *Seareiro Cristão* (Esperanto anguleto), *Manchete* (crônica de Rubem Braga), *Diário da Noite*, *Diário Carioca*, *Brasil Espirita*, *Brasil Rotário*, *Semanário* (O Esperanto, língua de confraternização dos povos, de Alberto Bonfim), *O Nosso* (julho de 1958), *Sésinho*, *Revista da Boa Vontade*, *Correio da Manhã*, *Jornal do Brasil*, *Jornal do Comércio*.

VERKOJ DE D-RO E. PRIVAT

	Cr\$
Vivo de Zamenhof. 4-a eld., bnd.	150,00
Historio de la Lingvo Esperanto, 2-a eld., 2 vols.	210,00
Esprimo de sentoj en Esperanto, 3-a eld.	80,00
Karlo. Facila legolibro	
por la instruado de Esperanto..	20,00

BRAZILA ESPERANTISTO

	Cr\$
Coleção dos anos de 1953 a 1958	100,00
Encadernada em 2 volumes	400,00

Esta coleção é particularmente interessante para os estudiosos da útil secção "Aperfeiçoe o seu conhecimento" e para os leitores do empolgante romance "O Mistério."

Um presente esplêndido

O mais belo livro em Esperanto

NEDERLANDO — MIRAKLOJ EL LA AKVOJ

Ricamente ilustrado e encadernado.

Cr\$ 1.500,00